


POR KE ĈIUJ ESTU UNU POR KE ĈIUJ ESTU UNU
UT UNUM SINT UT UNUM SINT



(Joh. 17,21)



ESPERO KATOLIKA

monata revuo fondita en jaro 1903 — oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

internacia katolika unuigo esperantista

fondita en 1910

honora prezidanto: pastro A. Beckers

Centra Oficejo

CH-9106 Zürchersmühle - Urnäsch
Svislando

Prezidanto:

Pastro D. F. Longoni
I-20051 Limbiate (Mi)
Italujo

Kasisto

Paul Scherer - Graber
CH-6020 Erlenstr. 58
Emmenbrücke (LU)
Svislando

Sekretario

Estraranoj:

A. Berka - Ĉeĥoslovakio
W. Mudrak - Aŭstrujo
P. M. Casanoves - Hispanujo
P. L. Kis - Jugoslavio
P. W. Flammer - Svislando
K. Van Kleef - Nederlando
N. W. Vigar - Anglujo
M. Švaček - Ĉeĥoslovakio
D-ro K. Perko - Aŭstrujo

Oficiala Revuo

Espero Katolika
(Fondita en 1903)

Redaktoro:

P. Felice Ruaro
37010 Costermano (Vr)
Italujo

Abonkotizo

sFr. 14,=

GRAVA ANONCO

Tre karaj gelegantoj,
lastamomente mi estas devigata, bedaŭrinde, anonci al vi, ke nia komuna kongreso IKUE-KELI ne okazos.

En Como ni esperis tutkore starigi nian komunan kongreson en Hungarujo; tamen, post kelke da monatoj, malgraŭ la klopodoj de pastro Kòbor kaj s-ino Eva Farkas, la hungara registaro ne permesis la kongreson.

Ni prizorgis trovi rimedon per aranĝo de nia kongreso en Beogrado, kelke da tagoj antaŭ la komenco de UK de UEA, t.e. de la 21.a ĝis la 27.a de la venonta julio.

Tiamaniere oni permesos al ĉeestontoj partopreni ankaŭ, laŭvole, la UK.on sen alia longa vojaĝo, sen aliaj gravaj elspezoj.

Ni prizorgis prepari apartajn aranĝojn por nia kongreso: la kongresejon, la preĝejon, la loĝejojn (por, proksimume, cent partoprenontaj, dank' al nia laborema delegito, pastro Stricki.

Ni jam ekspedis aliĝilojn.

Problemo stariĝis pri la daŭro de nia kongreso.

Ne estis eble aranĝi aparte vizitojn al la urbo, ekskursojn, koncertojn aŭ artajn manifestaciojn (kiujn mi nomas ornamaĵoj de la kongreso), ĉar nia kongreso ne povis havi oficialan permeson, kiel la UK. de UEA. Ni povis nur kunveni en Beogradon kiel simplaj turistoj, kaj kunveni en niajn ejojn. Se en nia kongreso ni povas programi nur prelegojn, diservojn kaj samspecajn erojn, unu semajno estas tro longa.

Do, ni pripensis mallongigi nian apartan kongreson, t. e. komenconte de la ĵaŭdo (20 a de Julio) por plenigi du tagojn de niaj apartaj laboroj, kaj lasi la ornamaĵojn al la aranĝoj de UK.

Tiu-ĉi solvo ne plaĉis al ĉiuj, ĉar ne ĉiuj ŝatas partopreni la UK.on de UEA. La grava striko de italaj poŝtservoj malrapidigis niajn interrilatojn.

Finfine, flanke de KELI, skribis al mi s-ro De BOER. kiu anoncis al mi intencon de KELI ne partopreni nian komunan kongreson pro la mallongigo de ĝia daŭro.

Mi ne juĝas; estos pli facile, ke oni juĝas min kai mian sintenon. Mi jam estas atendanta leterojn plenajn je korelaj akuzoj.

Tamen oni konsentu al mi la eskuzon de mia sincerplena agado.

La Prezidanto

Dekjara Pontifikado

En tiu ĉi monato la katolikaro festas la dekan jaron de la pontifikado de Paŭlo 6-a. Ni volas memori kun granda dankemo kaj estimo la dekjaran agadon de nia kara Papo.

Ni memoru la lastan ekumenan Koncilon, kiun li prezidis.


Ni memoru liajn vojaĝojn al malproksimaj landoj: kelkaj nomoi: Sankta Lando, Usono, Fatimo, Afriko, Filipinoj, Aŭstralio. Ni memoru liajn enciklikojn, el kiuj la plej famaj estas «Ecclesiam suam», «Populorum progressio», «Humanae vitae», «De coelibatu sacerdotali». Ni memoru liajn mesaĝojn, liajn predikojn, lian

senlaca agadon por la disvastigo de la kredo, por la paco kaj por la justeco en la mondo. Ni memoru lian saĝan reformon de la Roma Kurio, la pligrandigon de la Sankta Kolegio per novaj kardinaloj.

Dum ni pensas pri tiu senlaca agado, ni dankas al Dio, kiu donis al ni tiel fervoran paŝtiston.

Li parolas al la katolikaro kaj al la mondo kiel anstataŭanto de Kristo, kiu diris al Petro: «Mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo, kaj kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo, kaj kion ajn vi malligos sur la tero, tio estos malligita en la ĉielo».

Tiu ĉi dekjara datreveno estas por ni okazo plifortigi nian amon, nian obeemon, nian fidelecon al la Papo.



Nia amo helpas nin senti kaj kompreni la ĝojojn kaj la ĉagrenojn de la Sankta Patro. Li fariĝis papo en malfacila tempo. La rapidaj ŝanĝoj de la societo dum la lastaj jaroj kaŭzis krizon en la societo mem, en la familio, en la Eklezio. Tio alportis memkompreneble zorgojn, problemojn, ĉagrenojn al Paŭlo 6-a. Ni skribis pasintjare: «Kiam homo marŝas kurba sub pezo, ne estas permesite premi ĝin kaj ĝin fari netolerebla: justeco kaj karito postulas, ke oni subtenu ĉiun ajn oferon por ĝin malpezigi». Kun tiaj sentoj ni volas festi ĉi tiun dekan datrevenon.

La redaktoro

Moderneco kaj fideleco

(El la encikliko «*Ecclesiam suam*»)

La vorton «alĝustiĝo», kiun ni jam antaŭdifinis kiel proksimuman regulon de la Ekumena Koncilo, ni nun citas denove, por ke la senĉese renaskiĝanta viv-energio de la Eklezio, al kiu neiniam mankis la kapablo observi kaj orientiĝi, trafe atentigu nin pri la signoj de nia epoko; por ke, fine, dank' al sia juneca temperamento, ĝi ĉiam kaj ĉiuloke «ĉion elprovu kaj firme tenu tion, kio estas bona» (v. I Tes. 5,21).

Sed super tio necesas refoje kaj insiste aserti, ke la Eklezio malpli per ŝanĝado de siaj eksteraj leĝoj kapablos reakiri la freŝecon de sia juneco, ol per la memvola senrezerva submetiĝo al la Kristaj leĝoj, kiujn la Eklezio men donis al si, celante sekvi la vojojn de Kristo. msg

En tio ekzistas la forto de ĝia renoviĝo; en tio konsistas ĝia adaptiĝo-kion plej trale esprimas la greka vorto «metanoja»; - en tio kuŝas la realigo de ĝia perfekteco.

Povas esti, ke en certaj kazoj la Eklezio faciligos aŭ simpligos la observon de unu aŭ de alia el siaj leĝoj aŭ preskriboj, fidante je la libereco de la hodiaŭaj kristanoj, kiuj fariĝis unuflanke pli konsciaj pri siaj dovoj kaj aliflanke pli maturaj kaj pli kleraj en la decidoj. Malgraŭ ĉio la necesa kaj esenca postulo de la leĝo restas netuŝita.

Efektive la vivo kristana, kia la Eklezio ĝin proponas kaj rekomendas pere de sagace pripensitaj preskriboj, ĉiukaze postulas la kredon, la sinceran bonvolon kaj la strebon mastri sin kaj sin oferi; ĉiukaze ĝi kondukas al tiu «mallarĝa vojo», kiun la Dia Savanto priskribis; kaj de ni, nuntempaj kristanoj, ĝi postulas ja ne malpli grandan animforton, sed male eĉ pli grandan ol estis tiu de la pasinttempaj kristanoj; ĝi postulas tiun severan obeadon, kiun plenumi estas hodiaŭ same necese kaj malfacile, kiel en epokaj fruaj; tiu obeado nuntempe meritas eĉ pli altan ŝaton, ĉar ĝi rezultas el motivoj pli Diaj ol homaj.

(El la latina originalo tradukis d-ro W. Perrenoud kaj sac. W. Flammer)

EL NIAJ SEKCIOJ

KONGRESO DE U.E.C.I. EN VERONA

La kongreso de la italaj IKUE-anoj okazis, laŭ la programo, la 30-an de aprilo kaj la 1-an de majo. Kongresejo estis la konvento S. Bernardino da Siena en Verona. Prezidis P. Albino Ciccanti. La superulo de la konvento metis tre afable je dispono de la kongresanoj la preĝejon kaj la belegan salonon «Morone». Lunde ĉeestis la prezidanto de IKUE, sac. Ferdinando Longoni, kiu predikis dum la Meso esperantlingve celebrata; li lasis leteron por la kongresanoj, kiu estis legita marde posttagmeze dum la ĝenerala kunveno. Tre interesa estis la «renkontiĝa vespero»: ĥoro de Verona prezentis belegajn kantojn; liutisto aŭdigis renesancan muzikon kaj oni projektis du interesajn mallongajn filmojn.

Marde estis kuncelebrata S. Meso en Esperanto. Inter la kuncelebrantoj estis ankaŭ la kapuceno P. Georgo Korytkoski, kiu baldaŭ presigos sian tezon pri ekumenismo kaj Esperanto en la internacia lingvo kaj en la angla. Sekvis la aten-

dita parolado de Prof. Mario Dazini, vicprezidanto de la itala E-Federacio, pri la temo: «Internacia lingvo por la katolika Eklezio». La prelego estis en itala lingvo, ĉar ĉeestis ankaŭ multaj neesperantistoj. Ĉiuj aŭskultis kun intereso la paroladon.

Post-tagmeze, post la lego de letero de Pastro Longoni al la kongresanoj, oni diskutis pri la problemoj de la unuiĝo kaj oni elektis la estraron: praktike estis reelektitaj la malnovaj membroj: P. Albino Ciccanti (prezidanto de UECI), P. Ferdinando Longoni (vicprezidanto), D-ro Cesare Ferrari (kasisto), S-ro Franco Galbusera (sekretario). Nova membro por la junularo estas S-ro Glauco Corrado el Milano, kiu helpas P. Jacobitti en la redaktado de «Katolika Sento».

F.R.



KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ EN SOPOT

De la 24-a ĝis la 26-a de aprilo okazis en la pola urbo Sopot la 18-a Tutpollanda E-Kongreso.

Dum tri tagoj 380 polaj esperantistoj disputis pri la evoluo de la E-movado en Pollando.

Sopot last-tempe fariĝis la plej aktiva centro de nia movado. Tie troviĝas la unua pola Esperanto-muzeo, la internacia lingvo estas instruata en multaj lernejoj, okazas multaj E-aranĝoj.

Malgraŭ iuj malhelpoj polaj katolikoj organizis dum la kongreso tri diservojn kaj okazis renkontiĝo de pastroj esperantistoj. Jam marde la 24-an tuj antaŭ la malfermo de la kongreso okazis S. Meso. La sekvintan tagon 4 pastroj kuncelebris en la preĝejo de S. Mikaelo. Dank' al la parokestro Andreo Zebrowski okazis en lia loĝejo renkontiĝo de pastroj esperantistoj, dum kiu oni faris kelkajn decidojn pri la plua evoluo de la katolika E-movado en Pollando.

Posttagmeze grupo da katolikaj esperantistoj forveturis al Oliva, kie ĝi estis akceptita de la episkopo de Gdansk, Mons. Lech Kaczmarek, kiu tre interesiĝis pri la uzeblecoj de la internacia lingvo. La purpurulo esprimis dankon pro la vizito de la delegacio esperantista, bedaŭris pro la neeblo partopreni la jaŭdan E-Meson kaj promesis sendi salutleteron al la kongresanoj.

La lastan tagon de la kongreso denove okazis S. Meso en Esperanto en la kapelo de S.A. Bobola, kiun plenplenigis la esperantistoj. Kun-

celebris la Sanktan Oferon: A. Gucwa, K. Martynski, H. Paruzel, St. Pietrzak kaj J. Wal. Legis la epistolon Andreo Marszalkowski. Ĉe la komenco de la Meso la rektoro de la kapelo Pastro St. Bogdanowicz tralegis la leteron de la episkopo Lech Kaczmarek. Pastro Paruzel en sia prediko substrekis la vizion de la pola martiro S. Andreo Bobola pri la konvertiĝo de la Oriento, kiu devas esti instigo al polaj katolikoj por preni respondecon pri la helpo al la evoluigo de la Krista Eklezio en ĉiuj landoj de la socialisma tendaro.

Valoras aldoni, ke de julio ĉiudimanĉe je la 6a vespere okazos en Sopot sankta Meso en Esperanto.

Andreo Marszalkowski



SENDU RAPORTOJN

La redakcio de E.K. atendas raportojn pri aliaj kongresoj, kiuj okazis dum la lastaj monatoj, kaj pri la agado de niaj sekcioj. Se tio estas ebla, sendu kelkan foton.

Dank' al Dio nun la poŝto al kaj el Italujo vojaĝas bonorde.



«SKLAVOJ DE DIO»

Aperis antaŭ malmultaj monatoj la traduko de la hungara romano de

Géza Gárdonyi «Isten Rabiaj» (= sklavo de Dio), kiu estas rigardata en la hungara literaturo kiel unu el la modernaj klasikaĵoj. Tradukis en Esperanton nia IKUE-ano Johano Hamvai, al kiu ni esprimas nian plej koran gratulon kaj dankon.

La tradukinto konigas al ni la enhavon de la romano en sia antaŭparolo.

En la «Sklavo de Dio» ni ekkonas pere de la inventita persono de frato János la monakan kaj laikan vivon kaj kutimojn de la 13-a jarcento: ni iniciĝas en ĉiujn detalojn, kiujn ni havas pri la vivo de Sankta Margareta (Szent Margit) el la dinastio de Arpád. La gepatroj, Béla (Adalberto) la IV-a, kaj lia edzino, oferis ŝin al Dio jam antaŭ ŝia naskiĝo, por ke Dio liberu Hungaron de la mortiga danĝero de la tataro invado.

La ofero estis farita kaj la juna, belegra reĝidino fariĝis la «Lilio de Hungarujo», unu el la elstaraj sanktulinoj ne nur de sia Patrujo, sed ankaŭ de la tuta eklezio de Kristo. Ni aperigos en nia revuo kelkajn paĝojn de tiu romano, sed ĉiukaze oni konsilas legi la tutan romanon, kiun eldonis je la fino de 1972 la Hungara E-Asocio.

Bv. mendi la romanon al P. H. Paruzel - 41800 Zabrze 1 - Pollando

*La plej profita komerco estus tiu:
vendi la homojn kiom ili valoras
kaj revendi ilin kiom ili kredas
valori.*

Petit Senne



*La humileco estas antaŭkuranto
de la karito kiel Johano Baptisto
estis antaŭkuranto de Kristo.*

S. Francisko de Sales



*Se ni povus legi sur la frunto la
ĉagrenojn, multaj homoj, kiujn ni
envias, ekscitus nian kompaton.*

P. Metastasio



*En la profundo de l'animo estas
trezoroj kaŝitaj, kiujn nur la amo
malkovras.*

Eduard Rod



*La homoj estas pli malfortaj ol
malbonaj, pli indaj de kompatado
ol de malamo.*

Anconville



*Kiu ne suferis, ne konas la bonon
nek la malbonon, ne konas la
homojn, ne konas sin.*

Fenelon

JUĜOJ PRI ESPERANTO

Inter la multegaj juĝoj pri Esperanto plaĉas citi kelkajn juĝojn de elstaraj kaj famaj personoj.

1. S. Pio X-a, patrono de la esperantistoj:
«Mi rekonas la utilecon de Esperanto por konservi la unuecon de la katolikoj de la tuta mondo. Esperanto havas grandan estontecon».
2. Pio XII-a:
«Por la unueco de la popoloj Esperanto ludos en la moderna mondo la rolon, kiun la latina lingvo ludis en la pasintaj jarcentoj».
3. Alfonso la XIII-a, reĝo de Hispanujo:
«Se mi devus rekompenci la aŭtoron de Esperanto laŭ liaj meritoj, ne sufiĉus por li ĉiuj kavaliraj ordenoj de Hispanujo».
4. Leo Tolstoj, grandega rusa poeto:
«La ofero de iom da tempo por lerni Esperanton estas tiom malgranda kaj la rezultatoj, kiuj el ĝi devenas, tiom grandaj, ke neniu devus rifuzi fari tian provon».
5. Max Müller:
«Mi devas certe atribui al Esperanto la unuan rangon inter ĝiaj konkurantoj».
6. K. Kalocsay, mondfama verkisto, tradukisto kaj lingvisto:
«Oni devas rekoni, ke bona traduko de iu literatura ĉefverko povas esti en Esperanto tiel same bild- kaj esprimriĉa, tiel same pens- kaj sentreprodukta kaj elvokiva kiel la originalo, kaj eĉ povas ĉi tiun pli fidele speguli ol nacilingva traduko».
7. Alfonso Pechan, hungara aŭtoro de vastaj E-hungaraj vortaroj:
«Estas grave koni la fakton, ke ekde jarcentoj multaj provis solvi la problemon de internacia interkomprenilo kaj — malgraŭ pluraj centoj da planlingvoj — nur Esperanto estas disvastiĝinta tra la tuta terglobo, dum aliaj vivas ĉefe nur sur bretoj en bibliotekoj de maloftaĵoj aŭ eĉ nur en tirkestoj de skribotabloj».

KATOLIKA HORIZONTO

MILJARA JUBILEO DE PRAGO

Okaze de la miljara jubileo de la diocezo Prago Paŭlo 6-a sendis leteron al la apostola administranto de la ĉefurbo, Mons. Francisko Tomasek. La diocezo estis fundita en la jaro 973 de Papo Benedikto 6-a. Paŭlo 6-a reliefigis la gravecon de tiu evento, kiu transdonis kaj pliriĉigis la altvaloran heredaĵon alportitan al la slavaj popoloj de la sanktuloj Cirilo kaj Metodio. Paŭlo 6-a resumis la historion de Prago, rememorigis ĝiajn sanktulojn, ĉefe Adalberton kaj Johanon Nepomucenon, la kulturon, la firmegan ateston de katolika kredo kaj de fideleco al la Apostola Sidejo ankaŭ en malfacilaj situacioj, longan serion da animzorgantoj, kiuj famigis la patrujon kaj la tutan Eklezion.

En sia letero la Papo bondeziris, ke tiuj katolikoj restu fortaj en la kristana kredo kaj en la defendo de la kristana moralo, ĉerpante el la Dua Vatikana Koncilo stimulon al la renoviĝo; ke plifortiĝu la ligiloj inter la ĉefdiocezo kaj la Sankta Sidejo kaj ĉiam forta estu la sento de la frateco.



HEINEMANN EN VATIKANO

En marto la germana prezidanto Gustav Heinemann vizitis la Papon post siaj vizitoj al la italaj prezidento kaj ĉefministro.

Li esprimis sian estimon al la senlaca agado de Paŭlo 6-a por la paco kaj por la justeco en la mondo kaj bondeziris, ke ĝin estimu kaj subtenu ĉiuj homoj, al kiu ajn religio aŭ raso aŭ ideologio ili apartenas.

Je la germanlingva programo de Radio Vatikano li bondeziris fruktoplenan kunlaboradon inter ŝtatoj kaj eklezioj.

Koncerne la ekumenan movadon en sia lando Heinemann, kiu estis aŭtoritatulo en la reformita eklezio, diris interalie: «Katolikoj kaj protestantoj povas nur esperi, ke la Sinjoro de la Eklezio montros al ili la vojon por renkontiĝi: vojon, kiun ili nun ankoraŭ ne vidas».

PATRIARKO DE ALEKSANDRIO EN ROMO

La kopta-ortodoksa patriarko de Aleksandrio, Shenouda 3-a, vizitis oficiale la Papon en majo. Li ĉeestis la solenan Meson honore al S. Atanazio, episkopo de Aleksandrio antaŭ 16 jarcentoj. Dum la Meso la Papo esprimis sian profundan kortuŝon pro la ĉeesto de la estro de kristana eklezio separita jam de multaj jarcentoj kaj taksis tiun ĉeeston kiel feliĉan aŭguron de tiu «perfekta unueco, kiun la Papo kaj la katolika Eklezio post la Koncilo humile kaj sincere klopodas restarigi».

Post la Meso Shenouda 3-a proksimiĝis al la altaro kaj frate ĉirkaŭbrakis la Papon. En sia parolado en angla lingvo Shenouda esprimis la konvinkon, ke Dio preparis lian renkontiĝon kun la Roma Pontifiko por permesi gravan antaŭenpaŝon en la rilatoj inter la du eklezioj. Li diris, ke la maltrankviliga disvastigo de ideoj ateismaj materialismaj skeptikaj kaj malmoralaj postulas en la kristanoj pli kaj pli spiritan unuecon.

En sia respondo Paŭlo 6-a diris, ke la kristanoj devas porti al la mondo la kredon kaj la pacon, sed ke antaŭe la paco devas regni inter ili. La Papo aldonis, ke multaj punktoj kunigas katolikojn kaj nekatolikojn kaj bondeziris, ke ĉiuj klopodu atingi la perfektan unuecon per la helpo de Dio.



JACQUES MARITAIN

Aprile mortis en Toulouse la granda katolika filozofo Maritain. Li estis 91 jara. La gazetaro raportis dum pluraj tagoj pri la fama filozofo, takante lin «unu el plej grandaj profetoj de la katolika Eklezio», «inteligenta pioniro de la Koncilo», «unu el plej signifaj figuroj de la katolikismo», ktp. Li lernis filozofion en la universitato Sorbonne, tiam estis malkvieta en la koro kaj protestanto religie. Iom post iom li alproksimiĝis al la katolikismo kaj en 1906 li ricevis la bapton.

Li admiris la grandan filozofon kaj teologon Tomason de Akvino kaj fariĝis fervora tomisto. Lia domo en Meudon estis malfermita al ĉiuj intelektuloj, ankaŭ nekatolikaj. Li instruis filozofion en kelkaj universitatoj de Ameriko. Prezidanto De Gaulle sendis lin en Romon kiel sian reprezentanton apud la Sankta Seĝo. En Romo li verkis sian plej belan libron: «Humanisme intégral», kiu ekscitis fortajn akuzojn; sed pli varmaj kaj multnombraj estis

la konsentoj kaj la laŭdoj. Inter la konsentantoj estis ankaŭ Mons. Montini, la nuna papo, kiu prizorgis la italan tradukon de la libro. Pli ol 50 estas liaj libroj; la lasta, «L'Eglise du Christ», aperis en 1970: Maritain skribis ĝin en la konvento «Petits Frères de Charles de Foucauld» en Toulouse, kie li en silento, malriĉeco, preĝo kaj meditado pasigis siajn lastajn jarojn.



ALEKSANDRO MANZONI

Milano memorigas ĉijare sian grandan poeton kaj romaniston Aleksandron Manzoni okaze de la centa datreveno de lia morto. Solena memorigo okazis la 15-an de majo kun la ĉeesto de la itala prezidento Giovanni Leone kaj de la ĉefepiskopo de Milano, Kard. Giovanni Colombo.

Oni kantis la Meson «Requiem» de Verdi: la Meson, kiun li komponis okaze de la morto de la granda katolika poeto.

La verkoj de Manzoni montras lian profundan kristanan senton. Ni citas kelkajn verkojn:

En prozo: «I promessi sposi» (= la gefianĉoj), «Osservazioni sulla morale cattolica» (= Rimarkoj pri la katolika moralo);

En poezio: «Natale» (= Kristnasko), «Pentecoste» (= Pentekosto), «Nome di Maria» (= Nomo de Maria), «Cinque maggio» (= Kvina de majo), «Marzo 1821» (= Marto 1821) kaj du tragedioj: «Adelchi» kaj «Il conte di Carmagnola».



JUBILEO 1975

Dum la ĝenerala aŭdienco de la 9-a de majo Paŭlo VI-a anoncis: «Ni volas hodiaŭ doni al vi sciigon, kiun ni kredas tre grava por la spirita vivo de la Eklezio. Post kiam ni preĝis kaj pripensadis, ni decidis celebri en la proksima jaro 1975 la sanktan jaron...» .

Granda aplaŭdo akompanis la vortojn de la Sankta Patro.

La preparado de la jubileo komenciĝos en Pentekosto, por ke la tuta Eklezio tuj komencu ĝui tiun grandan okazon de renoviĝo kaj repaciĝo.

KARD. LARRAONA

La 7-an de majo forpasis la hispana kardinalo Arkadio Larraona, kiu dum multaj jaroj estis Supera Penitenciero kaj Prefekto de la Rito-kongregacio. La funebran Meson partoprenis 31 kardinaloj kaj la ambasadoroj hispanaj por Vatikano kaj Italujo.



S. ANTONO DE PADOVO

La 13-a de junio estas la festo de S. Antono. La statistikoj de la padova baziliko raportas pri la pasintjaroj oficialaj pilgrimadoj: 2140 italaj, 1930 eksterlandaj: el Germanujo (300 pilgrimadoj), el Francujo (240), el Usono (156), el Jugoslavio (146), el Hispanujo (125) kaj el aliaj 50 landoj.



PAPO JOHANO XXIII-a

Okaze de la deka datreveno de la morto de Johano 23-a en la tuta Eklezio oni rememorigas le neforgeseblan «bonan papon».

Ni aperigos en la venonta numero de EK artikolon pri li, verkitan de lia samdiocezano sac. B. Cadei, instruisto en la episkopa Seminario de Bergamo.



CEAUSESCU EN VATIKANO

La 26-an de majo la romena prezidento Nikolao Ceausescu estis akceptita en speciala aŭdienco de Paŭlo 6-a. Li estas la unua romena ŝtatestro, kiu vizitas oficiale la Papon. Memkompreneble oni ne devas atendi tujajn rezultojn kaj radikalan solvon de la gravaj kaj multaj problemoj de la romena eklezio; tamen oni esperas plibonigon de la klimato: tio estas necesa postulo por komenci rilatojn je reciproka konfido.

Pentekosto

Okaze de la 100-a datreveno de la morto de la granda poeto katolika Aleksandro Manzoni (el Milano) ni publikigas parton de lia odo «Pentecoste».

Spirit'! Humil-preĝante ni
ĉe sanktaj la altaroj,
aŭ sole en arbarprofund'
aŭ vage sur la maroj,
de l'Andoj frostaj ĝis Liban',
de l'Kimroj ĝis Haiti,
disaj ni povas riti
per ununura kor'.

Ni Vin petegas! Ho Spirit',
elvenu lumo kora,
favora al kredantoj Vin,
al nekonant' favora;
venu, vigligu: fajru kor'
jam pro dubado cindra;
estu venkinto inda
premi' post lukto-hor'.

Ni Vin petegas. Al pensar'
de la malfeliĉulo
enblovu Vi, refortigant',
ŝiriĝu la nebulo;
fariĝu tamen ŝtormo Vi
al pensoj de l' tirano,
kaj el la uragano
eliĝu la kompat'.

Per Vi rigardu malriĉul'
ĉielon vere sia,
kaj ĝemon ŝanĝu al pean'
pro siliec' Mesia;
riĉul' donacu kun vizaĝ'
amika kaj honesta,
kaj kun silent' modesta
kvazaŭ de frat' al frat'.

Vidiĝu Vi de l' etular'
en ĉarma la rideto,
de la knabin' en ĉasta ruĝ',
kaj sendu en sekreto
al puraj virgulinoj
puran sekretan ĝojon,
konsekru l'edzan vojon
de sindonema am'.

Fortigu de la junular'
la konfidencan menson,
al cela trafo de l' virar'
regu maturan penson,
hararon blankan pro maljun'
ornamu volo sankta,
kaj en rigard' mortanta
brilu espera flam'.

A. Manzoni



Sac. A. Beckers, honora Prezidanto de IKUE, skribis al sac. Longoni:

«... Mi volas aldoni kelkajn rimarkojn pri EK. EK ne estas religia revuo. La artikolojn, kiujn mi legis en la marta numero, mi jam legis en la revuo Informations Catholiques Internationales. EK estas Esperanto-revuo, en kiu oni povas aperigi, certe, ankaŭ religiajn artikolojn, sed ne nur religiajn artikolojn. Mi esperas, ke vi komprenas min. EK nun falas en la kontraŭan flankon ol en la tempo de Maul kaj Tuinder? En tiu tempo EK estis diskutrevuo pri progresema teologio kaj nur tio».

Noto de la redaktoro:

Nia Prezidanto sac. Longoni jam respondis private al sac. A. Beckers, kiun ni kore dankas pro lia sincera kritiko. La problemo estis pridiskutita pasint-

jare dum la kongreso en Como (EK 1972, N. 9), sed mi esperas, ke ĝi estos pli profunde pridiskutata en Kongreso kaj ke multaj gelegantoj esprimos ankaŭ perletere sian opinion kaj siajn dezirojn. Oni diras, ke la silento estas aprobo, do mi povas pensi, ke preskaŭ ĉiuj estas kontentaj; sed mi dubas pri tio. Laŭvere nia revuo ne enhavas nur religiajn artikolojn: ekzemple la rubrikoj «Esperanto en la mondo», «Lingva angulo», «Legantoj skribas», «Vento por nia muelilo» ne estas religiaj artikoloj. Kiam ni skribis pri toksoj, sociaj problemoj kaj literaturaj aferoj, ni ne verkis religiajn artikolojn. Multaj rakontoj, krom humoraĵoj, ne estas religiaj artikoloj. Nia revuo iras la mezan vojon inter du aliaj tezoj: nur religiaj artikoloj, nur pri Esperanto (literaturaj kaj lingvaj problemoj, kunvenoj kaj kursoj, programoj kaj agado nur sur la kampo de la internacia lingvo).

Kial ni raportas pri la vivo de la Eklezio en la mondo kaj aperigas artikolojn religiajn? Multaj gelegantoj deziras legi ankaŭ en Esperanto religiajn sciigojn, kiujn ili eble legis en naciaj revuoj; kelkaj samideanoj legas religiajn aferojn nur en nia revuo; religia revuo devas sentigi la problemojn de la Eklezio, ĝiajn esperojn, ĉagrenojn ktp.

Nia redakcio deziras multajn raportojn el la landaj sekcioj, ekzemplerojn de iliaj revuoj por ke EK donu vastan panoramon de nia agado. Kiel ni jam plurfoje skribis, ni atendas proponojn kaj konsilojn de la gelegantoj, ĉar ni sincere deziras fari EK pli leginda.

Ŝtelisto ŝtelis 10 banknotojn. Hejme li rigardis ilin kaj ekkriis: «En la mondo ekzistas multaj malhonestaj homoj; el 10 banknotoj 6 estas falsaj».

Kio unue necesas?

Sur nia planedo ne ĉio aspektas bone kaj kontentige. Ni observas kreskon de perversaj fortoj, kiuj sub preteksto feliĉigi la homaron strebas detrui ekzistantan ordon, altrudas siajn opiniojn religiajn, sociajn kaj politikajn. Tiuj konceptoj de ili proponataj en alloga formo plaĉas al multaj, kiuj senkritike ilin akceptas, trompante sin mem kaj aliulojn.

Tia manifestado de opinioj ofte estas utila, ĉar ĝi stimulas nian intelekton kaj defendas nin kontraŭ stagno, tamen se ili estas akceptataj senkritike, ili kaŭzas pli da damaĝo ol da profito.

Ni scias, kiel ofte ni eraras kaj kiel malfacile estas atingi la veron, objektivan veron. En mia artikoleto mi proponas al ĉiuj legantoj, kiuj sopiras al plibonigo de interhomaj rilatoj, kelkajn pensojn.

La deziro pri la reformo de la mondo, pri la eksigo el ĝi de maljusteco, starigo de paco kaj frateco inter la popoloj kaj sociaj klasoj estas vere nobla kaj laŭdinda. Tamen por realigi ĝin oni devas lerni, multe lerni kaj klopodi por akiri objektivan bildon de la realo. Sen esplorado de la vero, sen la kono de la objektiva realeco oni povus prijuĝi la situacion kaj, anstataŭ helpi niajn kunhomojn, oni damaĝus al ili, kiel apotekisto, kiu erare al malsanulo proponas venenon anstataŭ kuracilon.

Do antaŭ ol ni komencos ŝanĝi niajn kunhomojn, ni komencu ŝanĝi nin mem, ĉar tia estas la postulo de sana racio, tia la sperto de la saĝuloj, tia la ordono de Dio: ke la juĝanto komencu juĝon de si mem. Ni konscias, ke laŭnature ni estas ne perfektaj, sed potencialaj homoj: nur per memedukado kun helpo de Dia graco kaj aliaj entreprenoj ni estiĝas veraj homoj, laŭ la Dia bildo, homoj de virto kaj karaktero.

Se ni neglektas la devon de nia propra memedukado, ni perfidas nian konsciencan kaj alvokiĝon, kaj nia agado estas tiam senfrukta, vanta kaj malutila. Por ke tiel ne iĝu, regu nin la principo: «propra perfektigo, tuthoma feliĉigo».

Unua paŝo de katolika esperantista aktivulo estas realigi spiritan koncentriĝon, ekzemple per la praktiko de la 5 punktoj proponitaj en la 6-a numero 1972 de EK, t.e. konstanta memoro pri la ĉeesto de Dio; memoro pri propra malindeco; pardonpeto al Dio pro propraj kulpoj; unuiĝo kun Jesuo Eŭkaristia; prepariĝo al bona morto kaj al la eterna vivo.

Post tia prepara dispono ni alpaŝas al la sekvanta ŝtupo, t.e. forigo de malvirtoj, akirado de virtoj, dank' al kiuj ni iĝas vere bonaj kaj belkarakteraj homoj, ĉar nur ili estas taŭgaj transformi malbonajn kaj fiajn kutimojn en belajn kaj noblajn.

Virtoj ne falas el la ĉielo jam pretaj. Ni devas konkuri ilin per forta lukto kontraŭ ni mem. Atingo de ili similas al sporto, kie bonaj rezultoj postulas longdaŭran ekzercadon.

Se via humoro estas teda, netolerema, pigra, la kunvivo de aliuloj kun vi iĝas neelportebla; tiam klopodu ŝanĝi vin, kvankam tio povas ŝajni al vi nebla. Klopodu eĉ

dum kelkaj monatoj ekzerci vin en la virto kontraŭa al via dominanta pasio. Se vi persistos, se vi ne cedos al la apatio, tiam vi venkos.

Multe vin helpos la rimarko, kio en via konduto malplaĉas al viaj kunvivantoj, kio ilin plej frapas. Estus por vi utile peti viajn geamikojn, ke ili avertu vin pri viaj difektoj kaj direktu vin al ĝusta vojo.

Ĉiutage, precipe vespere, pli profunde ekzameni vin rilate al ĉi tiu objekto, kaj kvankam vi trovos multe da faloj, ne malesperu, ĉar post certa kun plezuro vi konstatos, ke la kvanto deviaj negativaj kvalitoj malgrandiĝis kaj via penego ne estis vana. Tiamaniere agante kaj severe prijuĝante vian konduton, vi lernos singarde prijuĝi viajn proksimulojn, fariĝos pli tolerema, pli ema helpi ilin en malfacilaĵoj kaj defendi ilin kontraŭ maljustaĵoj. Ke Dio nin helpu trovi kaj enpaŝi la konvenan vojon, kiu konduku al Li per meritplena agado.

Sac. Stefano Motyka

32-825 Borzecin - Pollando

VALOREGA GVIDILO

JASNA GÓRA - «Hela Monto», gvidilo - informilo, de Patro d-ro Kazimierz Szafraniec, paŭlano, 74 p., 12x16 cm, kun 24 nigro-blankaj fotreproduktitaĵoj de Frato Longin Jurkowski, paŭlano. Broŝurita. Pollingva. Eld. Jasna Góra - Czestochowa, 1971. Eldonkvanto: 30.000 ekz. Indikita prezo 12 zlotoj.

Kiel diras Patro Efrem Osiadly, Prioro de Jasna Góra en la «Enkonduka vorto» al la «gvidilo», «la eldonaĵo estas modesta laŭ la amplekso kaj laŭ la grafika aspekto de la libreto». Tamen fakte ĝi estas bonega, konciza helpilo al la vizitanto kaj al ĉiu interesiĝanto pri la

historio de la Monumento de Kulturo, ĝi kontribuas al la ekkono de profunda ligilo ekzistanta inter Maria, kaj la religia kaj kultura vivo». Kiel tion ege trafe esprimis la Prioro de Czestochowa Klostro. Nenion aldoni, nenion depreni. Ĝi estas eldonita en la pola lingvo, tamen ĉe la fino de la libreto troviĝas «Resumo» en kvin lingvoj: pola, rusa, angla, franca kaj germana. Oni povas nur deziri al si, por ke, se ne la tuto, do almenaŭ «Resumo» estu ankaŭ en esperanto; almenaŭ, se oni ne povas jam nun eldoni kaj aldoni konforman flugfolion al la jam ekzistanta libreto, do, por ke esperanta resumo aperu en baldaŭa nova eldono. Kaj jen.

LA RESUMO

JASNA GÓRA «Hela Monto» en Czestochowa (prononcu: Ĉenstoĥova) konata en eksterlando simple kiel Czestochowa, la plej granda Maria-Sanktejo en Pollando, estas forte kunligita kun

la historio de la pola popolo kiel la ĉefa kultocentro de la Sankta Virgulino, Reĝino de Pollando, kiel la patrineca klostro de Patroj Paŭlanoj kaj kiel la defenda historia fortikajo.

La kulto de Sankta Maria Virgulino en Jasna Góra esprimiĝas precipe per la honoro al la Dipatrino.


La bildo montras la Sanktan Virgulinon Maria kiel la Patrino de Dio, tenantan sur la maldekstra brako Jesuon-Infanon. La pentrita figuro de la Dipatrino estas montrita frontale; la oblonga ovalo de la vizaĝo havas koloron de bruligita tritiko. Du rimarkeblaj strekoj sur la dekstra vango de la bildo estas spuroj de profanado fare de invadintoj en la jaro 1430.

La bildo estas pentrita per tempera tekniko kaj ĝi enviciĝas inter la plej eminentaj artoverkoj de la mondo. La origina pentraĵo povis ekesti en la VI, VII

aŭ VIII-a jarcentoj. Nun ĝi aspektas tiel, ĝin renovigis kaj denove pentris eksterlandaj pentristoj en la jaroj 1430-1434 post la profanado de la bildo fare de rabistoj en la 1430-a jaro. La legendo atribuas la ekeston de la bildo al la Sankta Luko Evangelisto. Sendube, ĝi apartenas al la tiel nomata «Hodegetria» tipo, kio ĝenerale rilatas al la kopiitaj ikonoj, kiuj ĝis-kaj precipe post la konkero de Konstantinopolo fare de turkoj en la jaro 1453 estis konsiderataj kaj adorataj kiel originala portreto de la Dipatrino, propramane pentrita de Sankta Luko.

Jan Smykalski

(Daŭrigota)



Ĉu vi povas kalkuli laŭ nova maniero?

1. Cent — mitologia duonhoma besto.
2. Du — necerteco.
3. Tri — akvobesteto.
4. Kvar — necesa aranĝo dum epidemioj.
5. Kvin — plej subtila esenca parto.
6. Ses — kunsida periodo.
7. Sep — bela monato.
8. Ok — tre necesa gaso.
9. Naŭ — tre malagrabra sento.
10. Dek — grava rolanto en eklezio aŭ universitato.

Enmetu nur unu literon por fari la ŝanĝon:

1. de mola besto al bela ritma grupo;
2. de teniĝo al malpoezio;
3. de malantaŭaĵo al akva ekiro;
4. de skribfluido al fumaĵita porkvianado;
5. de puriga substanco al greka poetino;
6. de aera movo al mola korpoparto;
7. de fumilo al utila spico;
8. de pordfiksilo al kuracejo;
9. de utila fibro al parolilo;
10. de simbola historio al episkopa krono.

Solvoj I. Centaŭro, dubo, trito, kvaranteno, kvintesenco, sesio, septembro, oksigeno, naŭzo, dekano.

Solvoj II. Ka(n)to, p(r)ozo, fo(n)to, (ŝ)inko, Sap(f)o, vent(r)o, pip(r)o, klin(i)ko, lan(g)o, mit(r)o.

(El «The British Esperantist»)

landaj reprezentantoj

Anglujo

S-ro N. W. Vigar,
28 Franklands Drive,
Addlestone - Surrey

Aŭstralio

S-ro V. J. Timmins,
73 Alexandria Parade,
Hornsby N. S. W.

Aŭstrujo

S-ro W. Mudrak,
Beatrixgasse 19/9,
A-1030 Vien III, P. K. 105.713.

Belgujo

S-ro E. Paesmans,
L. Koepoortstraat 64,
Antwerpen, Telef. 321751 P. K. 41 45 89

Brazilo

B. E. L. Praça da Republica 54, 1 E.
Rio De Janeiro

Ĉeĥoslovakio

S-ro Ales Berka,
Na Harazi 1423, Vsetin

Francujo

S-ro Gaston Veron,
Place de la Petite Bruyère,
Donfront (Orne)
P. K.: G. Véron
CCP Rouen 1188-63 Z

Germanujo

S-ro Gerhard Vogel
Tondernstrasse 36, D-5 Köln 30
P. K. Köln 166355

Hispanujo

S-ro Miguel Martinez,
Av.da San José 105,
Pral. Zaragoza

Irlando

S-ro J. O' Reilly,
« Woodbine », Bluebell,
Dublin 12

Italujo

S-ro C. C. Ferrari,
Viale dei Mille 37,
I-20129 Milano Telef. 267.895,
P. K. 3-7791

Japanujo

S-ro Matubara Hatirô (Anselmo)
596 Oosaka-HU Kisiwada-si
Namimatu-Tyô, 4 ban, 5 gô

Jugoslavio

P. Felix Stricki,
Hadzi Melentija 75,
YU 1100 Beograd

Kanado

S-ino Pauline Proulx,
790-80 E Rue Est,
Charlesbourg, Québec

Kolombio

P. Louis E. Palacios Toral,
Apartado Aéreo 12-03,
Cartagena

Koreo

S-ro Paul Kiseng Kim,
I. P. O. Box 2752,
Seoul

Madagaskaro

S-ro Ramanantsoa Claude
Dominique Gérard
Cité Ambohipo 469
Tananarive

Nederlando

S-ro S. P. Smits;
Stahoudersring 326,
Zoetermeer, P. . 685124

Nov-Zelando

D-ro Hamway Johano,
29 Arran str. Avondale 7,
Auckland SW. 3

Polujo

Pola Katolica
Unuiĝo Esperantista,
Zabrze, Skr. PT. 68

Portugalujo

S-ro M. M. Lourenço Gouveio,
Caixa Postal 456,
Funchal-Madeira

Svislando

S-ro Lutz-Parolo Johann
Himmelrichstr. 61
CH 6010 Kriens

Urugvajo

D-ro R. Zeballos Morales,
Fray Marcos (Flor)

Usono

S-ro H. S. Corlett,
7605 Winona Lane,
Sebastopol, California 95472



Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)

Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando
Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)

Presejo: SCUOLA GRAFICA — Istituto Salesiano S. Zeno - v. Minzoni 50 — 37100 Verona

Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70